O. v. 4m
BIBLIOTEKO
Hector Hodler




"EGIPTA ESPERANTISTA ASOCIO"

# REGULARO

DE LA

## SOCIETO "ESPERANTO"

EN

ALEKSANDRIO

UNIVERSALA ESPERANTIA
BIBLIOTEKO
D 5350 1925

Fako: Ot
Sk. 4 Vol.
G. N. M.
Duoblajoj

# REGULARO

DE LA

SOCIETO “ESPERANTO“

EN

ALEKSANDRIO

# REGULARO
## DE LA SOCIETO "ESPERANTO"
### EN ALEKSANDRIO.

1.

Laŭ la invito de sinjoro Georgo Vilken, advokato kaj Delegito de Universala Esperanto Asocio, ni, subskribintaj, kunveninte, hodiaŭ 1 Decembre 1913 decidis fondi la societon, nomotan *Esperanto* kies tasko estos propagando kaj uzado de la lingvo Esperanto per lekcioj, lecionoj, kunvenoj, gazetoj, ludoj, kaj t. p.

2.

Membroj de l'*Esperanto* estos dividitaj je la:

1) Activaj membroj.

2) Helpantaj membroj, kaj,

3) Honoraj membroj.

Aktivaj membroj estas personoj, kiuj apartenas al la movado de Esperanto, parolas aŭ

lernas tiun lingvon kaj subskribas aliĝilon, estante rekomenditaj de du membroj de la Societo.

Helpantaj membroj estas tiuj, kiuj, aprobante la Esperantan movadon helpos al la Societo pagante la sumon de P.T. 20 ĉiumonate kaj subskribos aliĝilon, estante rekomenditaj de du membroj de la Societo.

Honoraj membroj provas esti ciuj personoj, distingindaj laŭ lia agado por Esperanto.

Persono, donacanta al la Societo minimume L.Eg. 5 fariĝas dumviva membro (activa, helpanta aŭ honora).

Ĉiuj activaj membroj de la Societo devas esti Membroj de Universala Esperanto Asocio.

3.

Kotizaĵo povas esti pagata aŭ ĉiumonate aŭ antauen por tutan jaron. Pagintaj ricevas kvitancon subskribitan de la Prezidanto aŭ Kasisto.

Ĉiu membro de la Societo kiu ne repagis sian kotizaĵon estos eksigita de la Societo laŭ la decido de la Komitato. Ĉiuokaze, se li deziros realiĝi, li devas, krom nepagita kotizaĵo, pagi ankoraŭ P.T. 40.

Estos ankaŭ eksigata membro kiu per lia konduto aŭ agado okazos malutila al Societo aŭ al Esperanta movado.

4.

Ĉiuj membroj de la Societo strikte obeas tiun ĉi regularon, kaj internan regularon de la Societo. Ili rajtas eniri en ĉiujn establojn de la Societo prezentante sian membrokarton, kaj povas, je sia persona respondeco enirigi siajn amikojn, trapasantajn Aleksandrion kaj ankaŭ iliajn konatulojn, al kiuj Prezidanto liveros provizoran enirkarton. Tiuĉi karto valoros nur dum dekkvin tagoj, sed laŭ la demando povos esti renovigita por kvin tagoj ankoraŭ.

5.

La gvidado de la Societo *Esperanto* estas komisiita al la Komitato kiu konsistas el Prezidanto, Vic-Prezidanto, Kasisto kaj du Konsilantoj elektotaj de la Ĝenerala Kunveno per secreta balotado por du jaroj.

6.

Membroj kiuj gis la tago de voĉdonado estos ne pagintaj kotizaĵon, ne povos partopreni balotadon, antaù ol elpagos ĝin al la kasisto.

7.

La Komitato fiksas la elspesojn, ellaboras budgeton, priparolas kaj decidas ĉiujn demandojn pri Societo, preparas raporton pri la agado, kaj presentas tiun raporton al la Ĝenerala Kunveno, elektas kaj eksigas la oficistojn, komunikas per helpo de Sekretario rimarkojn aù mallaùdojn al iu membro, se tio, ŝajnos necesa, ellaboras internan regularon, kiun zorgas efektivigi Prezidanto aù, laù lia mandato Sekretario, kiu kun Prezidanto prizorgos aukaú, tiamaniere, kia ŝajnos al ili la plej bona, organizadon de lekcioj, kunvenoj, ludoj, festoj, kaj t.p.

8.

Ĉiun demandon Komitato decidas laù la plimulto de voĉoj. Por valoro de decido kunvenon de Komitato devas ĉeesti ne malpli ol 3 membroj.

9.

Prezidanto de la Societo prezentas ĝin ĉie autaŭ Estraro, Tribunaloj, oficejoj, privataj personoj, societoj kaj t.p.

Dum foresto de Prezidanto, gvidisto, elektita el membroj de Komitato rajtigas elspesojn pagas, subskribas je la nomo de la Societo ĉuijn dokumentojn, kunvokas la Komitaton ĉiam, kiam tio ŝajnos al li necesa kaj prezidas la kunvenojn de Komitato.

10.

Kasisto enkasigas ĉiujn enspesojn de la Societo kaj pagas elspesojn laŭ la rajtigiloj subskribitaj de Prezidanto aŭ Sekretarioj. Li regule kaj ĝuste zorgas pri kaslibro. Li devas ankaŭ prezenti raporton pri sia administrado kaj monenhavo de la kaso al Sekretario ĉiam, kiam estos demandita. Li estos responda pri ĉiuj mankoj.

11.

Sekretario okupiĝas ĝenerale pri laboroj en Oficejo, tenas la librojn, Esperante aŭ France,

pretigas monraporton, kaj konservas arkivon. Li ankaŭ pretigas ĉiujn protokolojn.

Sekretario ne partoprenas Komitaton kaj estas elektita el membroj aŭ ekstere.

Tutfoje li havas konsultan voĉon en kunvenoj de Komitato.

12.

La Societo havas stampilon, konsistantan je verda stelo kun litero E meze kaj paroloj *Esperanto* Aleksandrio.

13.

La Societo ne estas disigebla ĝis kiam ĝi enhavos dudek efektivajn membrojn.

14.

Raportjaro komencas je la 1 Decembro kaj finiĝas je la 30 Novembro ĉiujare.

Ĉiutrimonate Komitato esploras financan staton de la Societo kaj aprobas raporton prezentotan al la Ĝenerala Kunveno, kunvokota ĉiutrimonate.

Komitato fiksas la sumojn, eltirotajn de neta profito kaj dediĉotajn aŭ al la monreservo aŭ

al la plibonigo de la Societo kaj progreso de la Esperanto.

15.

Krom ordinaraj Ĝeneralaj Kunvenoj estos konvokataj kunvenoj Eksterordinaraj-ĉiam kiam Komitato opinios tion necese aŭ laŭ la demando de almenaŭ dek efektivaj membroj.

16.

Ĝeneralaj Kunvenoj definitive decidas ĉiujn submetitajn al ili demandojn.

17.

Ĝeneralaj Kunvenoj estos kunvokitaj per avisoj, elpendigitaj en Societa ejo almenaŭ 10 tagoj plifrue, kaj decidrajtos iom ajn da membroj ĉeestos.

18.

Ĝeneralaj Kunvenoj decidas laŭ la plimulto da voĉoj, kaj okaze de egaleco decidas tiu de Prezidanto.

19.

Funkcioj de Komitatanoj estas honoraj. Nur Sekretario ricevos la salajron fiksotan de la Komitato.

20.

La disiĝo de la Societo estos decidita de la Ĝenerala Kunveno kion partoprenos almenaù du trionoj de membroj fondintoj laù la plimulto de voĉoj.

21.

Se disiĝo estus decidita, likvidado estos farita de tri membroj-fondintoj elektitaj de Ĝenerala Kunveno. Aktivo de la societo estos realigota de speciale delegotaj likvidantoj.

23.

Se post la elpago de obligacioj restos neta aktivo, ĝi estos dediĉita nur al la progreso de la Esperanta movado.

24.

Tiu-ĉi regularo estas ŝangota nur laŭ la decido de ĉiuj membroj de la valora Ĝenerala Kunveno.

25.

Tiu-ĉi regularo, estinte legata voĉe dum la Ĝenerala Kunveno estas aprobita kaj subskribita de ĉiuj membroj ĉeestantaj.